

Numero: 293.
Oktobro 2016.

24-a jarkolekto

VESPERTO

Literaturaj folioj



Redaktanto
Apáti Kovács Béla
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400
Telefona: 06/20/497-03-64
Retadreso: apatikb111@gmail.com
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

Ĉu esperantistoj ekzistas?

Preskaŭ ĉiutage oni demandas min: ĉu esperantistoj ankoraŭ ekzistas? Kiom da homoj parolas la zamenhofan lingvon? Kiuj parolas Esperanton? Ĉu ili estas homoj?

Bedaŭrinde post pli ol unu jarcento la homaro scias tre malmulte pri Esperanto. Kiuj scias ion, tio ofte estas falsa.

Kvankam geesperantistoj klopodas disvastigi ĝin, sed ofte ni batas nian kapon en malmolan muron.

Kompreneble mi akuzas neniun nacian lingvon, ke pro tio nia lingvo ne povas disvastiĝi en la mondo, kvankam multaj gesamideanoj pensas, la indiferecon kaŭzas aliaj grandaj mondlingvoj. Laŭ ili la homoj lernas ilin amase.

Mi vidas la problemon en la homa stulteco. Tiuj homoj diras opinion pri Esperanto, kiuj lernis neniun lingvon.

Ili diras malsaĝajn aferojn pri ĝi. Ili ĵuras, per Esperanto oni ne povas komuniko. Ĝia vortrezoro estas tre malriĉa por esprimi ĉion.

Interese tiuj, kiuj sukcesis ellerni plurajn lingvojn tiuj neniam atakas Esperanton.

Mi ne scias, ĉu jam estis farita statistiko pri tio, inter geesperantistoj kiom da homoj estas, kiuj scias plurajn naciajn lingvojn?

Kial ili simpatias kun la zamenhofa lingvo? Por mi ĝi estas granda sekreto. Kvankam tiuj ĉi homoj povus komprenigi sin ankaŭ sen Esperanto en la tuta mondo.

Ĉu tamen Esperanto estus pli utila? Estus bone kredi tion ĉi. La spirito de la Internacia Lingvo povas infektiĝi la homan animon kaj koron. Ĝi estas danĝera en la okuloj de multaj homoj.

Eble se sur la terglobo ekzistus unusola pontolingvo, tiam la homoj povus komprenigi sin kaj militoj estus eviteblaj pro miskomprenoj.

Alvenis la tempo forigi la dubojn pri Esperanto. Laŭ mi, ankaŭ ni geesperantistoj estas kulpaj, kial nia amata lingvo ne povis disvastiĝi.

Do, en la estonto nia tasko estos pruvi jam milfoje la lingvo estas kapabla por komunikado sur ĉiu tereno de la vivo.

Se tio ĉi sukcesos, espereble oni ne demandos en ĉiu minuto: ĉu esperantistoj ekzistas?

–Redaktanto–



Museto deziras lerni fremdan lingvon

En iu tago la museto vidis eksterlandanojn sur la strato, kiam ĝi volis iri tra la vojo. Ili ne povis komprenigi sin kun la lokanoj.

La eksterlandanoj demandis ion de viro, kiu ĝuste rigardis tra la fenestro:

–Kiel iri al la urbocentro? Ni esti fremduloj el malproksima lando. Ĉu vi povi helpi al ni.

Malgraŭ ĉiu klopodo la viro ne komprenis ilin. Fine la eksterlandanoj rezignis en la risko kaj ili iris plu.

La museto tiam decidis lerni iun fremdan lingvon. Sed ĝi ne sciis, kie ĝi povus lerni. Ĝi timis iri la lingvolernejo de homo. Krome homo havas katon, de kiu ĉiu muso timas.

Senkonsile ĝi iradis tien – reen en la ĉambro. Fine ĝi decidis, telefonas al sia kuzo la fluganta muso, alinome vesperto. Ĝi jam estis eksterlande kaj espereble ĝi scias, kie oni povas lerni fremdan lingvon.

–Alo, parenco mia! Mi estas via kuzo la museto.

–Alo, mi estas vesperto la fluganta.

–Salut' parenco! Bonvolu helpi al mi! Mi deziras lerni fremdan lingvon por ke mi povu komprenigi min kun eksterlandanoj.

–Bonege.

–Ĉu vi scias, kie mi povus lerni?

–Jes, kompreneble. En nia najbaro loĝas fama lingvoinstruisto.

La museto ĝojegis. Ankaŭ ĝi ellernos fremdan lingvon kaj ĝi povos komuniki kun eksterlandanoj.

Ĝi iris al la donita adreso. La museto longe premis la butonon de la sonorilo. Jam ĝi volis iri hejmen pensante, ke la lingvoinstruisto forestas. Sed en la lasta sekundo larĝe malfermiĝis la pordo.

Antaŭ la museto staris granda, nigra virkato.

–Kion vi deziras? – ĝi demandis interesiĝante.

La museto apenaŭ povis ekspiri pro la surprizo. Ĝi ne atendis tian instruiston.

Ĉu lerni fremdan lingvon de kato? Terure! Ne! Ne! Ĝi jam ne deziras lerni. Sufiĉas por ĝi sia belega gepatra lingvo. Ankoraŭ ĝi aŭdis:

–Bonvolu enveni!

Ĝi kuregis, kiel ekspresa trajno. Vivi estas pli bone, ol fariĝi la tagmanĝo de virkato.

–Ŝaŝa–



Poezio

Estas aŭtune kaj la vesperoj jam estas longaj. Bone sidadi en varma ĉambro kaj legadi. Legu ĉiutage ankaŭ poemojn.

Mi legas preskaŭ ĉiutage versojn. Ankaŭ vi faru tion.

Nun ĉi tie mi rekomendas kelkajn belegajn poemojn. Hodiaŭ mi prezentas al vi kelkajn poemojn de Emeriko Szabó.

Imre Szabó: *Strangaj ritmoj*

Strangaj ritmoj kuras tra la koro,
jamboj, ditramboj de la ploro,
lantaj spondeoj, viglaj amfibrakoj,
suno serena de senvivraj lagoj.

Mi nun lasas kuri la anhelon,
ĉasu ĝi la bonon kaj la belon,
restu ĝi fine, kiel la hundido
miaanime sola la ermito.

Mi respondus la demandon ĉu, ĉu,
mil-milfoje, kaj mi dirus: plaĉu
eĉ la vibrantaj, feblaj, etaj vortoj
de la finiĝo: elĉerpiĝis fortoj.



Imre Szabó *Mi atendis vin*

Mi atendis vin la tutan tagon,
denove tutan tagon,
mi frotadas la tagojn,
kiel rozarion
monaĥino klostroprofunde
inter la dikaj, mukozaj muroj,
en ĉi enorma premilo
lante fluetas la elpremitaj
vortoj de la preĝo
la masonaĵo de la muroj
estas preĝo de la antaŭaj
jam delonge foririntaj
al la lule lilia tiliejo
kun sia rozario
ili kuŝas tie sube
kun rozariaj manoj

virgaj senkulpaj senpensaj
kaj ili estas feliĉaj
pli grasas la herboj
super ilia kuŝejo,
la ĉielo estas pli fore
ol iam ajn,
du metrojn sube
ili resurektos
nepre ili resurektos
ĉar oni ellevos ilin
la psalmoj ellevos ilin
la psalmoj kiel larĝaj flagoj
ŝvebe rampos al la
gardostaraj arboj
al la arbaroj por vindi ilin
kaj engluti
kiel la apenaŭ moviĝanta
eterneco vermoplana
kaj iliaj ostoj iros
al la altaroj por sanktigi ilin
ĉiu gramo da ostoj valoros pli
ol tri gramoj da oro
Kaj nun mi staras en tiu ĉi premilo
kolosa liganta la karnon al la ĉielo
kie vakuas la sentoj
malplenokulaj anĝeloj flugadas
de nenio al imago
kaj reen...
Donu al mi pacon Sinjoro
permesu ke defalu tiuj sopiroj
kiel kardoj el la hundofelo
mi povu stari antaŭ vi
suverene sensufere
ho Sinjoro, lasu
ke mi elvomu la spasmajn tagojn
la spasmojn kaj la tagojn
ilin ambaŭ aparte
kaj malpleniĝinte mi sentu la ĝuon
de malsato malsato
kiun sopiras stomakmalsanuloj.
Lasu ke mi elvomu min
Ho, Sinjoro, senreste
mi frotadas la suferojn
grandgloban rozarion



Pri du malsamaj universoj



Lastatempe mi trovis tiun ĉi sciencan novaĵon (ankaŭ ĉi-tie) kaj legante ĝin mi pensis, kiel miskompreno de vortoj kiuj por la publiko havas iun signifon sed uziĝas per fizikistoj celante aliajn signifojn povas kaŭzi konfuzon. El vidpunkto de la fiziko la novaĵo mem estas nur iom interesa. Mi unue provas iomete priklarigi ĝin.

Pluraj observoj aludas al tio ke, nia kosmo antaŭe estas trairinta praeksplodon (en. Big Bang) kaj depost tiam senĉese plivastiĝas. Unu el tiuj observoj estas kosma fona radiado (en. Cosmic Background Radiation). Ĉiu materio elsendas (radias) elektromagnetajn ondojn krom se ĝia temperaturo estas absoluta nul (gradoj kelvin = minuso 273 celsiaj gradoj). Ondolongo de tiu radiado determiniĝas per temperaturo de la materio. Ekzemple metalo sur kuiraparato kiam ĝi ege varmiĝas brilas unue ruĝe kaj poste se la temperaturo estas ege alta blanke. Nia korpo elsendas elektromagnetajn ondojn kiuj estas infraruĝaj. Pro tio aparatoj kiuj detektas infraruĝajn radiadojn povas detekti homajn korpojn en mallumaj lokoj. Alia afero estas tio, ke materio kiam estas premita varmiĝas. En tempo de la praeksplodo ĉiu materio en la kosmo estis ege premita do havis tre altan temperaturon. Tiam la materio radiis. Kun disvastiĝo de la kosmo la fotonoj de tiu radiado perdis siajn energiojn kaj densecon. Hodiaŭ ni kapablas ricevi kaj mezuri tiujn fotonojn kiuj kongruas kun radiado de materio je temperaturo 3 kelvinaj gradoj. La kosma fona radiado estas unu el la plej firmaj apogantaj indikoj por la praeksploada modelo.

La kosma fona radiado atingas nin kun proksimume sama denseco el ĉiu direkto de la ĉielo. Tial oni konsideras ĝin pli-malpli homogena. Sed tio estas proksimuma skalo. Fakte la kosma fona radiado havas malhomogenecojn. Nun grupo da sciencistoj estas antaŭmetintaj tiun ideon, ke kelkaj el la plej gravaj perturboj en la fona radiado povas esti indiko pri tio, ke nia kosmo estas koliziinta kun aliaj

kosmoj. Nu, por mi la novaĵo estis iomete interesa sed la komentoj estis pli interesa. Multaj el la komentariintoj estis konsternitaj pro uzo de la vorto universo. Mia opinio ili pravas. Por la publiko la vorto universo signifas “*la tuto de ĉio, kio ekzistas*”. Tial ĝi estas ununura kaj ne povas esti pluraj. Por fizikistoj ‘universo’ signifas ‘*kosma sistemo kun fiziko aparta al si mem*’. Tial por la fizikistoj ekzisto de pluraj universoj ne estas debatoveka. Dum ekzisto de pluraj universoj por persono kiu konsideras literaturan signifon de la vorto estas kontraŭ logiko.

Mi antaŭe estas jam skribinta pri diferencoj inter signifoj de vortoj kiam ili uziĝas per la publiko kaj kiam ili uziĝas per fakuloj de iu branĉo de la scienco.

—Beĉjo—



(Rimarko: Esperanto ofte estas atakata, ĉar ĝin oni ne povas uzi por fakliteraturo.

La malamikoj de la Zamenhofa lingvo devas scii, ankaŭ per ĉi tiu lingvo oni povas traduki ĉion, tiel, kiel per la naciaj lingvoj.

Do, Esperanto havas ankaŭ riĉegan fakliteraturon sur ĉiu tereno.)



Por infanoj



Amuza brezita pasto

Bezوناتaj materialoj: 1 glaso por mezuri, bovlo por miksi, kulero por miksi, makaronia rulpremilo, biskvita tranĉilo aŭ simpla tranĉilo, muldilo, kulero, dentpinglo, 2 glasoj da salo, 2 glasoj (pli malpli) da varmeta akvo, 5 glasoj da faruno, maldika sukero, tinkturo, peniko.

Aĝo: 9 jaroj aŭ pli (se malpliaĝa, petu helpon al gepatroj)



Viaj filoj povas fari figurojn per brezita pasto, kiun ili mem faros kaj kuiras; la malpliaĝaj povas fari stelojn kaj lunojn (aŭ skulpturaĵojn malpli artaj) per tiu recepto de amuza brezita pasto.

Komencu per preparado de la pasto: miksu la salon kaj la farunon kaj sekvu aldonante la akvon malrapide (pli malpli du glasojn), laŭnecese por igi la paston facilmanipulebla. Kiam ĝi estas bone miksitaj, manpremu ĝis senti ĝin mola.

Post tio, premu la premrulilon sur ĝi, rulante ĝin, ĝis kiam la pasto estu plata, je malmultaj centimetroj de dikeco.

Tranĉu la paston je la formoj kiujn vi volos. Vi povos uzi biskvitajn tranĉilojn aŭ

simplan tranĉilon por fari lunojn, stelojn, korojn aŭ kiajn ajn figurojn laŭ via volo. Vi povos uzi la tenilon de la kulero por fari buŝon, se vi estos kreante figurojn kaj volu vidigi sur ili homajn vizaĝojn. Dentpinglo metita ene la paston kaj delikate rondigita taŭgas por formi la okulojn. Skulptu la nazon per tranĉilo aŭ alia ilo.

Se iun el tiaj formoj vi volos pendigi, faru trueton per dentpinglo, poste svingu ĝin rondigante ĝis kiam la truo sufiĉu por fadeni, ŝnureto, aŭ bendeto transpasi ĝin.

Kiam ĉiuj viaj formoj estos pretaj, aranĝu ilin sur bakilo kaj baku ilin per meza varmo dum unu horo. Poste, kiam ili malvarmigu, vi povos pentri ilin aŭ kovri per maldika sukero.

Fonto: 150 Nekonkurigaj Ludoj por infanoj - Cynthia MacGregor - Madras Eldonejo Ltda

Traduko al Esperanto: Rodrigo de Carvalho Mendonça



HUMURO

En hospitalo

–Sinjorino, mi gratulas al vi, via filino sane naskiĝis!

–Ĉu? Oni diris al mi, ke ĝi estos knabo.

–Dio mia! – ekkrias la akuŝisto – mi denove tranĉis alian anstataŭ la umblilika ŝnuro.

*



*

Infano al sia patrino:

–Panjo, kial estas senharara paĉjo mia?

–Ĉar li cerbumas multe.

–Kial vi havas longan hararon?

–Nu, tuj iru por ludi!

*

–Ne timu, se vi estos maljunulo, ankaŭ mi nutros vin je legomaĵo.



HUMURO

Knabeto alvenis hejmen el la lernejo kaj li rakontas al sia patro:

–Imagu paĉjo, en la lernejo ni lernis, en ĉiu vintro kelkaj bestoj ricevos novan felon.

–Silentu, fileto mia! Mi ne volas, ke via patrino sciigu pri tio!

*



La matematikoinstruisto demandas knabeton:

–Kiel vi dividus 17 abrikotojn por 7 infanoj?

–Mi farus el ĝi konfiktajn.

*



*

Antaŭ la drinkejo kuŝas viro sur la trotuaro. Preteriranto demandas:

–Kio okazis al vi?

–Mi estas la reklamo de ĉi drinkejo.

*